EKO 2022
Esperiga Komuniko
Subtene al la regiona, landa kaj loka agado
UEA · ILEI · IFEF
Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 39** ● Balta AMO ● ILEI kaj VEKI ● Kostariko ● Ekzamenoj < julio 22

# AMO 87 – balta fokuso

Okazis unuafoje ĝis nun Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) en Litovio, kaj entute en la baltaj ŝtatoj. Tio dankindas al la realigo de AMO 87 kadre de la 56-a BET en Klaipeda, apudmara havena urbo de Litovio - la tria plej granda urbo de la lando. La temo estis 'Baltio en Eŭropa kunteksto', kiu estis traktita en Mondskala Kunteksto (socia, politika, kultura, lingva ktp.) kaj Movada, kie ni sopiras pli fortan rolon por la baltaj landaj movadoj, precipe en Latvio kaj Estonio. La litova movado relative bone fortas, kun sidejo en Kaunas (en la Zamenhofa strato 5), kun la kapablo tiri pli ol 250 aliĝintojn al BET.

Post la malfermo kaj bonvenigaj vortoj de la patro de AMO, la podio estis transdonita al prof. Duncan Charters, la prezidanto de UEA, por skizi siajn esperojn por pli vigla rolo por la Landaj Asocioj de la balta regiono. Duncan parolis pri la novaj strategioj por UEA en la mandato de la nova estraro. Li emfazis la subtenon de UEA al la AMO-programo, kiu spertos sian centan seminarion frue en 2023. AMO temas ĝuste pri trejnado kaj UEA nepre bezonas pli bone trejnitajn aktivulojn, interalie kun kapablo regi la teknikaĵojn dum kongresoj. Unu rolo de AMO estas riveli problemojn, ne por deprimiĝi pri ili, sed por elpensi solvojn aŭ mildigon de la problemo.

Duncan emfazis la historian rolon de la balto en la frua historio de la Movado – jam de Zamenhof mem. Fine, li revenis al la strategia plano kaj ĝiaj fokustemoj, kie la grandaj bezonoj estas sproni la rejunigon de la komunumo, precipe tra Eŭropo kaj partoj de Azio.

La partoprenantaro de AMO en ĵaŭdo estis plej optimisme priskribebla kiel 'modesta', kun nur dek partoprenantoj, sed ja elstaraj aktivuloj el Germanio, Usono, Finnlando, Pollando kaj Litovio. Ambaŭ estraranoj de UEA ĉeestantantaj en BET partoprenis, kune kun la prezidanto de la Germana landa asocio de UEA (GEA), kiu rakontis pri la tradicio de dulandaj kongresoj – ekzemple Germanio kun Danlando, Pollando aŭ Francio, kiuj foje altiris la partoprenon ankaŭ de baltianoj.

Venis freŝa informo por pli vasta publiko: post multjara servado, la finno Tuomo ('ne tuŝu teknikaĵojn') Grundstrom forlasis la prezidantecon de EAF por pludoni la stafeton al pli juna persono el Turku. La patro de AMO, estante la respondeculo en UEA pri landa agado, povis konsili kontaktadon inter Finnlando kaj Norvegio, kiu havas relative junan (laŭ Eo-normoj) prezidanton, s-ron Bård Hekland.

Tio levis la konstaton ĉe la supre nomita patro-figuro, ke Finnlando neniam gastigis AMO-seminarion. Nu, iom post la centa.



Partoprenantoj en BET 56. Sukcesplena agrabla renkontiĝo de homoj el multaj landoj

Venis fine de la seminario en Klaipeda, ke AMO ne rajtas aroge ordoni al la balto kun fari, kion ni absolute akceptas. Sekve ni iomete modifos la enkondukan prezentaĵon por la seminario antaŭ ol alkroĉi ĝin al la nuna komuniko.

En vendredo okazis FLAM-analizo pri la balta movado. Ni pretigos la rezultojn por tio por baldaŭa EKO-komuniko.

## BET havis eksteran eĥon

Historia kaj kultura novaĵretejo *Voruta.lt* publikigis ampleksan artikolon pri BET-56 en Klaipėda: https://www.voruta.lt/baltijos-esperantininku-dienos-klaipedoje/

Povilas JEGOROVAS

## Esperanto-Tago – afiŝoj en multegaj lingvoj

Tiaj afiŝoj jam ekzistas en multaj lingvoj, aŭ estas pretigataj, vidu kaj elŝutu tie: http://www.linguistic-rights.org/esperanto-tago/esperanto-tago-2022.html

Stefano Keller

## ILEI kaj VEKI bone evoluas

Ĝis nun aliĝis 222 esperantistoj al la 3-a virtuala Esperanto-kongreso de ILEI (VEKI-3). Se vi ankoraŭ ne estas inter la aliĝintoj, tuj aliĝu al la grandioza evento de ILEI, kiu entenas pli ol 30 interesajn prelegojn kaj seson da koncertoj! Ankaŭ ĉi-jare kadre de VEKI okazos ILEI-Simpozio kaj AMO-Seminario (la 89-a). Por rapida kaj senpaga aliĝo bv. viziti: https://forms.gle/BcFUQPyxrF8Hpnr4A.

La ĝisnunan programon de la evento vidu en: https://www.espero.ir/eo/veki-3/

## Komercistoj facile alireblaj

Jen mi sendas ligilon de la artikolo pri IKEF sur la retejo de UEA Facila: https://uea.facila.org/artikoloj/movado/komerco-kaj-ekonomio-en-esperanto-ikef-agas-r309/

Ni dankas la redaktinton Anna Lowenstein kaj la voĉleginton Chelsea Rae Moses!

Enkhee, Ĝenerala sekretario de IKEF

## Kostarika rekresko

Mesaĝio sendita al la prezidanto de UEA, Duncan Charters.

“Mi ege ĝojas saluti vin. La celo de ĉi tiu komuniko estas informi vin pri la elekto de nova estraro de Kostarika Esperanto-Asocio (KREA), aliĝinta landa asocio de UEA ekde 1999. La 2-an de julio, KREA kunvenis por diskuti temojn rilatajn al la movado kaj al la agado en Kostariko. Dum tiu kunveno, ni priparolis pasintecon, nunecon kaj estontecon de la loka movado kaj elektis novan estraron de KREA, kies membrojn mi citas jene:

- **Prezidanto:** Benjamín Álvarez Rodríguez (fightsthumbs@gmail.com)
- **Vic-prezidanto:** Emmanuel de Jesús Alfaro Blanco (emmanuel.alfaroblanco@ucr.ac.cr)
- **Estrarano:** Jorge Antonio Leoni de León (tiberido@yahoo.com)
- **Estrarano:** Hugo Mora Poltronieri (tikoguau@gmail.com)
- **Estrarano:** Jesús Recinos Sancho (jesus041002@gmail.com)

Krom la estraro, en la kunveno ankaŭ estis elektita la observanto de KREA antaŭ la Komitato de UEA, nome s-ano Jorge Antonio Leoni de León (kun aparta adreso por tiu ĉi tasko: apartado.de.antonio@gmail.com).

La estraro de KREA denove kunvenos la 26-an de julio, koincide kun la datreveno de la eldono de la Unua Libro, kiam ni  konfirmos la daŭron de la estraraneco.

Benjamín Álvarez Rodríguez, *Pura Vida* — Vivplene, Prezidanto de KREA

## Aliĝoj por UK bele kreskis, jen ondo da informoj

Danke al 135 novaj aliĝoj, registritaj dum du semajnoj ekde la 30a de junio ĝis la 13-a de julio, la nombro da aliĝintoj al la 107-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu komenciĝos la 6-an de aŭgusto en Montrealo, kreskis ĝis 745 kaj superis la postmilitan malrekordon de UK-99 en Bonaero (2014) kun nur 706 aliĝintoj. Legu pli en la novaĵretejo “La Ondo de Esperanto” https://sezonoj.ru/2022/07/montrealo-25/

## Ekzamenoj reviviĝas - <edukado.net> raportas

Titolo: Sukcese debutis la retaj KER-ekzameno

Komence de julio 2022 finiĝis tre grava laborperiodo de la redaktoro de nia paĝaro. Katalin Kováts, estro de la KER-Ekzamena Centro (KER-EC),  kun sia teamo dum la unuaj ses monatoj de la jaro okupiĝis pri la restartigo de la ekzamensistemo de UEA, testante la novan nivelon C2, kreante la teknikajn bazojn de la retaj ekzamenoj kaj organizante la unuajn retajn ekzamenojn. Nun ni raportas pri tiu lasta eventoserio, kadre de kiu en tri sinsekvaj semajnfinoj ekde la 18-a de junio okazis ekzamenoj je C1-, B2- kaj B1-niveloj. La ekzamenojn partoprenis entute 83 personoj el 30 landoj (krom el Afriko, el ĉiuj kontinentoj).

Legu pli ĉe la paĝo: https://edukado.net/novajhoj?id=873

# AMO 87 EKO-EKE,
# AMO 88 EKO-VOSTE

## AMO 88 – programo por la tuj sekva seminario

AMO-seminario kaj la 6-a Internacia Simpozio (hibride)
Jelena Góra, Pollando – la 25-a de julio, inter 9:00-12:00
En la Karkonoŝa Akademio de Aplikataj Sciencoj
Temo: "135 jaroj de Esperanto - homoj, lingvo, kulturo kaj okazintaĵoj"

PRELEGOJ

1. Andreo Bobkiewicz (Pollando);Tyburcjusz Tyblewski kaj Adam Pleśnar – du polaj esperantistoj kaj du diversaj Esperanto-defendantoj".
2. Goro Christoph Kimura (Japanio) –'Esperanto - unika fenomeno en la monda lingva historio
3. Josip Pleadin – 'La tradicio de Esperanto en Kroatio kiel nemateria kultura heredaĵo'.
4. James Piton (Brazilo) – 'Bildkarta vizito al la Universalaj Kongresoj, kiujn Zamenhof partoprenis'
5. Stefan MacGill (Hungario) – '135 jaroj de Esperanto – kiom vere tutmonda?'

========= vortoj: 1149 =========

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.